



# *Esperanto en Danio*

24-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2017




Organizaĵo de  
la Unuiĝintaj  
Nacioj por Edukado,  
Scienco kaj Kulturo

## **La 100<sup>a</sup> mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof**

Solenata sub la aŭspicio de UNESKO

“Se ni ne rakontas ke  
Esperanto ekzistas, ĝi vere  
ne plu ekzistos.  
La estonto de nia bela kaj  
efika internacia lingvo  
dependas de ĉiu  
esperantisto.  
Pro tio ni devas ĝin  
diskonigi multe pli...”



## **Esperanto en Danio**

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### **Adreso de la prezidanto:**

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 [peter@wraae.dk](mailto:peter@wraae.dk)

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

### **Kromaj estraranoj:**

Finn Østerbæk (kasisto)

Ileana Schrøder (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Arne Casper

### **Redakcia adreso:**

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### **Presado:**

DDFO

### **Adresŝanĝoj al:**

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

[finnoesterbaek@gmail.com](mailto:finnoesterbaek@gmail.com)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**15.08.2017**

## **Enhavo**

Jarraporto de DEA 2016.....3

Ĝenerala kunveno 2017.....9

Zamenhof kaj Sejmo.....10

Programo de KEK.....11

Biciklado kun mortintoj.....12

Miaj impresoj el vojaĝo en

Nepalo.....22

De jarlibro al “horlibro”.....26

Aperis libreto de Pasporta

Servo.....27

LibroServo vendas.....27

# Jarraporto de DEA 2016

*De Peter Wraae*

Ni en la estraro estis aktivaj en pluraj flankoj, kelkaj el ili estis tradiciaj.

Kiel kutime ni ĉeestis en *Krop-Sind-Ånd* en la Falkoner-Centro. Ni kutime trovas plurajn homojn kiuj serioze interesiĝas kiam ili aŭdas pri nia lingvo, sed bedaŭrinde ne ĉiuj lernas ĝin.

La unuan de majo ni tradicie partoprenis en la internacia laborista tago en Fælledparken. Estis bela tago kun bona vetero.

Universala Kongreso (UK) okazis 2016 en Nitro en Slovakio. Ni en DEA frue anoncis komunan vojaĝon kune kun svedaj esperantistoj, kaj ni estis grupo kiu havis ĝojan vojaĝon al Nitro kaj reen. Ni renkontiĝis post la fino de UK kaj havis agrablan vesperon.

Kunlabore kun KEK, DEA aranĝis sukcsan Zamenhofan feston la 11-an de Decembro. Feliĉe venis muzikistoj kiuj distris nin. Krome Ileana Schrøder preligis pri la noveldonita libro de Ole Terkelsen. Ana Røssum faris kukojn kaj Bent Jensenius organizis multon. Dankon al ĉiuj por krei agrablan tagon.

Kadre de Erasmus+ projekto por kiu Ileana sukcesis ricevi subtenon, estis sendita Finn Østerbæk al Herzberg, kaj laŭ mia impresio li multe ridetis poste.

La junulara sekcio DEJO bedaŭrinde ne estas aktiva.

## **Eksteraj rilatoj**

Mi interkonsentis kun Ileana Schrøder ke ŝi flegos la rilatojn al eksteraj organizaĵojn tiel longe kiel ŝi volos. Ŝi mem starigis la kontaktojn, kaj laŭ mi ŝi diligente zorgas pri tiu kampo. Mi daŭre laboras kaj kompreneble tio okupas la pliparton de mia tempo, do por ni ambaŭ estas bona solvo.

Ni daŭre estas membro de la reprezenta komitato de la UN-Asocio,

membras en KUKS, la ombrela asocio de danaj kaj alilandaj kulturaj asocioj, de la neregistara organizo de Baltaj Landoj kaj de la “Ministerio de Paco” (Fredsminderiet), ombrela organizo de asocioj de la pacmovado. Tiamaniere ni plenumas la taskon esti videblaj ekster niaj esperantaj rondoj.

Mi aparte povas mencii ekzemplon pri la graveco esti videblaj ekster la movado, nome unu el la sukcesoj kiun mi havis kiel reprezentanto de DEA ĉe UN-Asocio. Dum la ĝenerala kunveno de la UN-Asocio en Oktobro 2016 oni diskutis kaj aprobis la novan principan programon. Unu el la punktoj de la princip-programo estis la homaj rajtoj. Mi sukcesis enmetigi “lingvajn rajtojn” en la teksto pri diversaj homaj rajtoj. Do, gravas aktivi en signifaj asocioj, kiuj havas la saman celon kiel ni, eĉ se oni ne tuj vidas la avantaĝojn, ĉar se oni longdaŭre partoprenas en la laboro de la aliaj asocioj, subite venas iam okazoj kie ni povas emfazi nian starpunkton.

## **Fejsbuko**

Betty Catterjee bone zorgas pri nia Fejsbuka paĝon “Amikoj de Dana Esperanto Asocio” kiun nun havas 327 membrojn. Dankon al vi Betty por tiu grava laboro.

## **Hejmpaĝo**

Tiu temo estas iomete bedaŭrinda afero, ĉar ĝi tute paneis pro viruso. Unue Ileana starigis kontakton al Morten kiu zorgas pri ĝi, ĉar mi estis en Nepalo, kaj poste mi. Morten estas tre agrabla homo, sed dum longa tempo ni petis lin fari kelkajn korektadojn, kiujn li bedaŭrinde ne havis la tempon por fari. Tial mi petis mian filon Jeppe ĝis la fundo rekonstrui la hejmpaĝon, kaj li feliĉe havas tempon por tiu laboro. Li ankaŭ akceptas estontece fari korektadojn por malalta salajro.

## **Libroservo**

*Raportas Arne Casper*

La Libroservo iris en pasivan staton, ĉar malmultaj aĉetas librojn.

## Jarraporto de la kluboj

*KEK- Kopenhago Esperanta Klubo. Raportas Bent Jensenius.*

En aprilo lastjare Peter Wraae iĝis prezidanto de DEA kaj tial oni petis min iĝi prezidanto de KEK. Cetere la estraro de KEK restis sama, efektive Peter kaj mi nur interŝanĝis lokojn.

En 2016 ni partoprenis en diversaj aranĝoj:

- *Krop sind og ånd* (ankaŭ ĉijare)
- La unua de majo en Fælledparken
- La senpaga ekspozicio *Rejsemessen* en Øksnehallen (La estro de tiu ekspozicio deziris havi ekzempleron de Tinĉjo kaj tial KEK ofertis aĉeti tiun al iu ajn kiu havas).

Ni ne partoprenis en la kutima aranĝo *Smag på Verden* pro la logika kauzo ke ĝi ne plu ekzistas. Tio estas tre bedaŭrinda. Kaj ankaŭ ne en la kultura nokto. Okazas tro multe da aferoj samtempe kaj malmultaj vizitas nin.

La aranĝoj rezultis en malmultaj novaj lernantoj. Wolfgang havis malgrandan grupon de komencantoj kiuj nun bedaŭrinde haltis. Sed kiom da personoj interesiĝas pri nia lingvo, legas pri ĝi en la reto kaj eble komencas lerni ĝin rete – tion ni ne scias.

Je la fino de 2016 estis 35 membroj, inter ili du dumvivaj membroj.

Ni daŭre kunvenas ĉiujn lundojn. Tio kutimo ni heredis de DEFA (La fervojista klubo).

Ni havas diversajn programerojn. La plej specialaj estas:

Zamenhof vesperoj (pro la 100 jariĝo de la morto de nia majstro).

Betty prelegis pri la dana koncepto “hygge”. Tiuj kiuj maltrafis tiun prelegon povas vojaĝi al Skotlando en majo. Tie ŝi faros la prelegon denove dum la kongreso en Edinburgo.

Jimmy Stryhn Meier, kiu loĝas kaj laboras en la Eŭropa Parlamento en Luksemburgo, venis kaj respondis demandojn. Estis sukcesa vespero kaj la

komenco de espereble aro da aranĝoj kun la temo “Tiu estas mia (esperanta) vivo”. (La “viktimoj” por la printempo en 2017 estas Sven Friis Jørgensen kaj Sven Ziegler; Ziegler tamen ne povis veni).

En la klubvespero ni unufoje skajpis kun samideano en Finnlando sur granda ekrana (por ni). Tiun eblecon ni devas evoluigi estonte (kiel Betty faris en *Verdenskulturcenteret* dum la Kultura Nokto en 2015).

En septembro lastjare la Kulturgrupo aranĝis piediran ekskurson “en la piedspuroj de Zamenhof” laŭ la bona ideo de Betty. En majo KEK refaros tiun ekskurson por ĉiuj.

Tiu aranĝo estas bona por memorigi nin pri la kaŭzo de la fondiĝo de KEK. Oni starigis la klubon en januaro 1908 precipe por prepari la alvenon de Zamenhof en aŭgusto en la sama jaro.

### ***Aarhus Esperanto Klubo. Raportas Stenislav Mielczarek***

La jaro 2016 estis bona. Ni bonvenigis 2 novajn, junajn membrojn, nome Jonatan Nordentoft Korgaard kaj Tobias Nowak. La klubo havas nun 27 membrojn. Ni daŭre kunvenas en Folkested, Carl Blochs Gade 28, 8000 Aarhus C. La kunvenejo estas komunuma kaj tute senpaga.

Ni povas esti kontentaj pri la partoprenado en la kunvenoj.

En januaro la temo de la kunveno estis “Kia estis la jaro 2015 kaj kion vi atendas de la nova 2016-a jaro?”

En februaro okazis Ĝenerala kunveno. La estraro nun konsistas el: Stanisław Mielczarek – prezidanto, Grethe Kvist – kasistino, Tove Bak, Marie Holdt, Byrial Jensen (kiu anstataŭis Henry Simonsen) kaj Erik Hjorth (anstataŭanto).

En la estraron de Fonduso de Betty Jensen ni elektis: Stanisław Mielczarek, Grethe Kvist, Tove Bak kaj Byrial Jensen (anstataŭanto).

Revizoroj: Azhar Shah, kiu anstataŭis malsaniĝintan Jørgen Kristoffersen, Eckhard Bick kaj Tove Jyding (anstataŭanto).

Komence de aprilo Grethe Kvist kaj Erik Hjorth, kiuj ŝatas ludi ŝakon,

instruis nin pri la principoj de tiu malnova ludo. Ni povis konstati, ke ŝako postulas matematikan cerbon.

Fine de aprilo Jonatan Nordentoft Korgaard prelegis je la temo “Kial junuloj ne parolas Esperanton kaj kion ni faru por ŝanĝi tion?” Tiu tre aktuala temo vekis viglan diskuton.

En majo Byrial Jensen konatigis nin kun Ido, “reformita” Esperanto, kiun kreis en la jaro 1908 Louis Couturat, franca matematikisto kaj lingvisto kaj Leopold Leau, franca matematikisto.

La Somera ekskurso 2016 okazis la malfruan someron, nome en aŭgusto. Ĝia celo estis Viborg. Unue ni rigardis Sønæs – novan eksteran refreŝigan aranĝon kombinitan kun puriga lageto. Poste ni vizitis Viborg-muzeon, kie ni estis bonŝancaj rigardi diversajn eksponaĵojn el la filmoj de Olsen-banden. Poste ni vizitis Viborg-katedralon kaj Dollerup bakker. La ekskurso, tre sukcesa, finiĝis en Birgittelyst Kro je tortoj kun kafo kaj teo.

Al nia unua kunveno post la somera ferio, en Septembro, venis la nove elektita prezidanto de Dana Esperanto-Asocio – Peter Wraae. La prezidanto ŝajnas optimista, fervora samideano.

Peter Wraae demandis ĉu ni eventuale povus aranĝi Jarkunvenon 2017 de Dana Esperanto-Asocio. Ni, bedaŭrinde devis respondi ke ne. Mankas al ni laborfortoj kaj krom tio Aarhus estos Eŭropa Kultura Ĉefurbo 2017, kio malfaciligus aranĝadon.

Somere nia nova kaj juna klubano – Jonatan Nordentoft Korgaard partoprenis la 72-an Internacian Junularan Kongreson en Wrocław, Pollando. Dankante por subvencio al la partopreno en IJK Jonatan faris du prelegojn: en oktobro “Mia vojaĝo al la 72-a Internacia Junulara Kongreso en Pollando” kaj en novembro: “Kion mi lernis pri la junulara Esperantomovado dum la partopreno en la IJK?”

En decembro, laŭ la tradicio, ni solenis Zamenhof-tagon kaj Kristnaskon.

Henry Simonsen tradicie amuzis nin per Kristnasko-historieto. Okaze de la Zamenhofa Jaro 2017 Stanisław Mielczarek aranĝis konkurson kun libropremioj.

Ni ĝuis varman vinon kun bulkoj, kafon/teon kun kuketoj. Bedaŭrinde mankis Agnete kaj Jørgen Kristoffersen. Pro la malsano de Jørgen ili ne povis partopreni kaj esti – kiel kutime – aranĝo-majstroj.

Dankon al vi ĉiuj por bona kunlaboro en la 2016-a jaro! Ni esperu, ke la kuranta jaro ankaŭ estos bona!

*Nordjutlanda Esperanto Klubo. Raportas Ejnar Hjort.*

En 2016 ni estis 20 membroj kaj 3 subtenantoj.

Dum la ekspozicio en Aalborghallen, ni denove disdonis pli ol 500 ekzemplerojn de informiloj pri Esperanto, kun reklamo por Duolingo kaj kun telefono kaj adreso, kie oni povas lerni Esperanton en Aalborg. Do mi esperas, ke kelkaj reagos kaj kontaktos nin.

Mi ripetadas, ke la plej grava afero por ni kaj por la kluboj estas informi pri Esperanto kaj oferti instruadon. Se ni ne faras tion, la kluboj mortos. Nia kluba aktiveco estas preskaŭ nur ekspozicioj kaj kursoj. Ni havas 2 kursojn en du niveloj, Lunde kaj Merkrede.

Nia jara kotizo estis sama kiel en la antaŭa jaro. La membroj de la estraro estis: prezidanto: Ejnar Hjorth; kasisto: Karen Jørgensen, sekretario: Else Hjorth, membro: Annette Holck.



*La partoprenantoj de la jarkunveno en Kolding*



# Ĝenerala kunveno 2017

*Protokolo de la ordinara ĝenerala kunveno de DEA 2017, Dimanĉe la 26-an de Marto, je la horo 9.30 en Danhostel, Ørnsborgvej 10, Kolding.*

1. Elekto de kunvena gvidanto. Elektiĝis Ana Røssum.
2. Elekto de protokolanto. Elektiĝis Grethe Kvist.
3. Jara raporto. Peter Wraae prezentis la jarraporton. Ileana raportis pri sia laboro en la dana UN-Asocio. Plej grava atingo: Lingvaj rajtoj eniris en la tekston pri la diversaj homaj rajtoj. Komentoj al la jara raporto: Kim opiniis ke la asertita pasiveco de DEJO ne tute veras. Okazis unu kurso en Studenterhuset. Fejsbuko devus mencii la jarkunvenon de DEA. La jara raporto estis aprobita.
4. Jara kalkulaĵo. Arne Casper prezentis la kalkulaĵon. Estas subskriba eraro: La nuna prezidanto Peter Wraae devus subskribi anstataŭ la antaŭa prezidanto Ileana Schrøder. La kalkulaĵo estis aprobita.
5. Laborplano de DEA 2017-2018. Peter prezentis la laborplanon.  
Kommento: Jens Larsen opiniis, ke ni interesiĝu pri datrevenoj de historiaj eventoj, plej aktuale la vendo de la antaŭe danaj Karibaj insuloj al Usono, emfazante la lingvan aspekton. Ekzemple la Karibaj Insuloj havis sian propran kreolan lingvon. Jens pripensos verki artikolon pri tio. La laborplano estis aprobita.
6. Proponoj: Venis neniuj proponoj.
7. Elekto de prezidanto. Peter Wraa reelektiĝis.
8. Elekto de estraranoj. Finn Østerbæk kaj Jens Larsen reelektiĝis. (La tuta estraro estas: Peter Wraae, Arne Casper, Bent Jensenius, Finn Østerbæk, Ileana Schrøder kaj Jens Larsen.)
9. Elekto de 2 anstataŭantoj. Ejnar Hjorth reelektiĝis kaj Ana Røssum novelektiĝis.
10. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto. Tara Gregers kaj Sven Sandø reelektiĝis. Anstataŭanto ne estis elektita.

11. Jara asembleo 2018. La plano estas jarkunveni kune kun la sveda kaj eble ankaŭ kun la norvega movado. Ni ne jam trovis la lokon, sed la svedoj proponis ke ni okazigu ĝin en la pramo inter Kopenhago kaj Oslo. Se la prezo estas tro alta, ni serĉos lokon ĉe la sudokcidenta marbordo de Svedio.

12. Eventualaĵoj.

Jens Larsen decidis ĉesi kiel redaktoro de Esperanto en Danio je la jarfino 2017/18. Li ne vidas la sencon uzi laborfortojn por produkti paperan membrogazeton, kiun la granda plimulto povus legi rete. Sekvis vigla diskuto, ĉu ni havu paperan membrogazeton aŭ ne. Membrogazeto havas du funkciojn: Servo al la membroj kaj reklamo al ekstera mondo, kondiĉe ke ĝi aspektas bele. Pli simpla papera membroinformilo ne havus tiun lastan funkcion kaj la sendokostoj restus same altaj. Enketo ĉe la partoprenantoj de la kunveno montris, ke la plimulto preferas konservi la membrogazeton. Ĉar Ileana estas kunredaktanto, mankas ĉefe teknika redaktanto. La estraro devos trovi solvon en la daŭro de la jaro.

Kim Henriksen reparolis pri la laboro de la junaj (kaj junecaj) esperantistoj en Danio. DEJO aktivadas en la Roskilde-festivalo kaj kiel kunaranĝanto da Kultura Esperanto Festivalo. Ileana atentigis, ke pluraj ne estas membroj de DEJO kaj/aŭ DEA kaj eble pro tio ilia laboro ne videblas ĉe DEA. La estraro pripensu kiel plibonigi rilatojn kaj kunlaboron.

## **Zamenhof kaj Sejmo**

La Pola parlamento Sejmo omaĝis Zamenhof jaŭdon, la 7-an de aprilo. La omaĝo okazis ĉ. la horo 13.25. Jam kvin minutojn poste aperis en la retejo de Sejmo artikolo pri la evento kaj pri Zamenhof

Koincide, pro grava diskuto tiutaga, ĉeestis la pola Registaro kaj la estro de la reganta partio, Jarosław Kaczyński (do omaĝis la kreinton de Esperanto la plej altaj reprezentantoj de tiu politika grupo, kies membroj ne estis montrintaj en iuj lokoj, ekzemple en Bjalistoko, sufiĉan favoron al Esperanto).

*Maria Majerczak*

## Programo de KEK

Konversacia Esperanto-Klubo kunvenas **ĉiulunde je la 19-a horo** en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2430 Kopenhago NV. Bonvolu eniri la kulturdomon malantaŭe per la pordo ĉe la aŭto-parkejo.

8. majo: Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Paŝo 7.

15. majo: Babila vespero. Venu babili pri ĉio aŭ nenio

**Dimanĉe** la 21. majo

EN LA PIEDSPUROJ DE ZAMENHOF. Urba rondirado.

Zamenhof vizitis Kopenhagon en la jaro 1908. Ni iras pli-malpli en la piedspuroj de la frua Esperanto-movado en Kopenhago kaj vidas interalie la hotelon kie Zamenhof loĝis kaj havis sekretan renkontiĝon kun la fama lingvisto Otto Jespersen.

Ni komencas je la 11a horo en Kongens Nytorv 1/Nyhavn 2 (første baggård) antaŭ la artgalerio Charlottenborg. Meze de la promenado ni manĝas, verŝajne en Rizraz, kaj finas ĉe la Urbodomo.

22. majo: Diskuto pro kaj pri la hieraŭa piedirado, eventuale. per skajpa konekto kun eksterlandanoj.

29. majo: Lumbild-prelego pri Latvio. Gvidas Bent.

5. junio: PENTEKOSTO – Ne estas programo.

8. junio: Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Paŝo 8.

12. junio: Tio estas mia (esperanta) vivo. Iu nomota respondas demandojn de la ĉeestantoj.

19. junio: Someraj kongresoj: UK en Koreio, Eŭropa kongreso. Partoprenintoj raportas.

## Biciklado kun mortintoj

*La centjara datreveno de la forpaso de Zamenhof estas celebrata ĉie en la mondo. La 17-an de Aprilo, du tagojn post la preciza dato, kvin Esperantistoj en Kopenhago partoprenis tiun celebradon en tute nekutima maniero: biciklado de unu Esperantista memorejo al alia tra la urbo. La bicikladon gvidis Jens S. Larsen kaj partoprenis Peter Wraae, Betty Chatterjee (ambaŭ en aŭto), Jørgen Manniche kaj Jacob Nordfalk. Kvantkam malmultaj, la partoprenantoj estis treege kontentaj pri la aranĝo. Eble estas establita nova tradicio: unu printempa biciklado kun ĉiĉeronado en Esperanto kaj alia aŭtuna en la Dana lingvo (por komencantoj kaj aliaj interesitoj). Jen kio estis dirita ĉe ĉiu haltejo:*

### 1-a haltejo: “Burger King”

#### ĉe la angulo de “Strøget” kaj “Rådhuspladsen”



– La kruciĝo de la ĉefa piedira strato kaj la granda urbodoma placo de Kopenhago kompreneble estas tre facile trovebla ... sed kiel do rilatas al Esperanto tia duaranga Usona rapidmanĝeja ĉeno kiel Burger King?

Jen kion oni nature demandos, se oni nenion scias pri la historio de Esperanto en Kopenhago. Kaj se oni iom scias, oni objetos ke estus multe pli bone renkontiĝi antaŭ la domo de la granda gazeto Politiken, ĉar ankaŭ ĝi situas ĉe la urbodoma placo, kaj ja siatempe Politiken estis tiu kiu ekstartigis Esperanton en Danio.

Kaj vera estas tio. Unu el la plej fruaj Esperanto-pioniroj de Danio estis **Frederik Skeel-Giörling** (1876-1910), lingvoinstruisto en Aalborg. Lin Politiken invitis al Kopenhago en 1907 por gvidi Esperanto-kurson. Ĝi estis grandega sukceso, kaj rapide oni starigis multege da kluboj kaj landan asocion.

Sed Politiken translokiĝis al la urbodoma placo nur en 1912! En la domo de Politiken oni havis ne nur redakcejojn, sed ankaŭ librovendejojn kaj ekspoziciojn

kaj prelegojn kaj vendadon de teatraj kaj tramaj biletoj. Tia speco de kultura centro estis tre avangarda tiutempe.

Tamen, jam tiam estis du ĉefaj gazetoj en Kopenhago: la progresema Politiken kaj la konservativa Berlingske Tidende. Do kiam Politiken ekkonstruis sian domon, ĉe Berlingske oni tuj pensis: “Ups! Se Politiken havas domon kun librovendejo kaj ekspozicioj kaj prelegoj kaj vendado de teatraj kaj tramaj biletoj ... tiam ankaŭ ni devas havi tion!” Sed ili ne volis nomi ĝin simple “la domo de Berlingske Tidende” – devis esti ŝike kaj moderne, kaj la rezulto estis *B.T.-Centralen*. Ĝis 1977 tiu centrejo situis ĝuste ĉi tie, kie nun rezidas Burger King.

Sed kiel B.T.-Centralen do rilatis al Esperanto? Nu, la unua posedanto de ĝia librovendejo estis **Louise Blicher**. Ŝi kaj ŝia edzo ambaŭ estis fervoraj Esperantistoj. Tuj post la unua mondmilito en 1917 ŝi organizis en B.T.-Centralen ekspozicion kaj serion da prelegoj pri Esperanto, kaj ili estis sufiĉe granda sukceso. Tamen tute ne rezultis tia re-ekstartigo kiel el la kursoj de Politiken; inter 1919 kaj 1926 la Danaj Esperantistoj eĉ ne havis propran revuon! Tio akre kontrastas al Germanio, kie Esperanto vere prosperis dum la 20-aj jaroj.

Sed kial do Esperanto estis tiel prospera antaŭ la unua mondmilito kaj tiel neprospera post la milito? La respondon al ambaŭ tiuj demandoj oni fakte povas respuri al unu sama persono, kaj lin ni nun iras iom rigardi. Estas tiel mallonge ke indas iri piede.

## **2-a halto: La busto de Vilhelm Thomsen en “Frue Plads”**

**Vilhelm Thomsen** (1842–1929) estis siatempe la plej elstara lingvisto de Danio – iuj eĉ volis diri ke de la tuta mondo! Hodiaŭ antaŭ precize 115 jaroj li estis rektoro de la universitato kaj tial devis fari festparoladon okaze de la naskiĝtago de la reĝo. Estis enorme solena festo. Ĉeestis ne nur ĉiuj profesoroj kaj studentoj, sed ankaŭ la ĉefepiskopo, la kortega marŝalo kaj tri princaj moŝtoj en propraj altaj personoj. Kaj pri kio do parolis la monde plej eminenta lingvisto tiumomente?

Li parolis pri la internacia lingva problemo de la scienco post kiam Latino iĝis ne uzata. Thomsen antaŭvidis tri eblajn solvojn: Unue, oni povus reenkonduki Latinon, sed tion li opiniis ne ebla. Due, oni povus akordiĝi pri unu nacia

lingvo, kaj Thomsen opiniis ke tiam estu la Angla. Sed, li diris, oni konsideru ankaŭ la trian eblecon, nome konstrui tute novan kaj facile lerneblan neŭtralan lingvon. Kaj se oni havu neŭtralan lingvon, tiu apenaŭ povus esti iu krom Esperanto!

Do, matene la 17-an de Aprilo 1902 Esperanto estis nenio tre grava. Se iu kun memrespekto parolis pri ĝi, estis por ridindigi ĝin. Vespere la 17-an de Aprilo 1902, male, Esperanto jam estis io tute serioze diskutebla – sole nur pro la aŭtoritato de Vilhelm Thomsen en lingvaj aferoj. Nedubeble, do, Thomsen estas granda heroo en la Dana Esperanto-historio.

Sed samtempe li estas granda fripono! Li nome ne kredis ke oni povus aŭ devus identigi sin kun la internacia lingvo, tiel ke oni komencus esprimi sentojn en ĝi; tio estu tasko sole de la gepatra nacia lingvo. Hodiaŭ ni scias ke tio estas sensencaĵo, ĉar multege da Danoj facile esprimas siajn sentojn en la Angla, kaj ne malmultaj povas tion fari ankaŭ, ekzemple, en la Turka aŭ la Sveda. Sed tiutempe multege da homoj pensis simile kiel Thomsen, kaj ili certe multas ankoraŭ hodiaŭ.

Se estus nur pro Vilhelm Thomsen mem, ne estus tiel grave, ĉar li poste ne okupiĝis pri la demando de internacia lingvo. Sed lia parolado inspiris lian proksiman kunlaboranton **Otto Jespersen** (1860-1943). La ĉefideo de Jespersen estis *progreso en la lingvo*. Li opiniis ke la malnovaj lingvoj, precipe Latino, estis pli maltaŭgaj por esprimi pensojn ol la pli novaj lingvoj, precipe la Angla. Li do opiniis ke iuj lingvoj *objektive* estas pli bonaj ol aliaj – kaj li opiniis ke oni povas plibonigi la unuopajn lingvojn per konscia lingvoplanado.

Jespersen opiniis Esperanton pli bona ol la naciaj lingvoj, kaj la Esperantistoj kompreneble entuziasmis pro tio. Sed la ĝojo daŭris mallonge, ĉar en 1908 Jespersen estis logita en internacian grupon kiu volis “plibonigi” Esperanton. Tamen ne multaj sekvis lin, ĉar la tutmonde la Esperantistoj mildadire ne ŝatis la ideon devi relerni sian lingvon!

La unua mondmilito venis kiel ŝoko, sed post la milito la du grupoj ja devis provi konvinki unu la alian pri tio kiu pravas. Ni nun vizitos la Esperantiston kiu plej multe diskutis kun Jespersen dum la intermilita tempo. Ŝi estas entombigita en la urboparto Østerbro, proksime al la Usona ambasadejo, en la tombejo “Garnisons”.

### 3-a halto: La tombo de Margrethe Noll (Garnisons A-158a)

Sur la tomboŝtono de **Margrethe Noll** (1874-1962) oni povas legi ke ŝi estis la “patrino de la Dana Esperanto-movado”. Ŝi lernis la lingvon en la kurso de Politiken kaj estis gvida figuro en la movado dum la pliparto de sia vivo. Kiam eksplodis la unua mondmilito en 1914, ŝi helpis vojaĝigi la familion Zamenhof hejmen al Varsovio. Ili estis en Germanio survoje al la Universala Kongreso en Parizo; necesis revojaĝi tra la neŭtralaj landoj Danio kaj Svedio, ĉar la limo inter Germanio kaj Rusio estis fermita.

Ke Jespersen aliĝis al la reformo, kompreneble estis granda perdo al la Esperanto-movado, precipe la Dana. Ankaŭ en Danio la reformita lingvo allogis nur treege malmultajn homojn, sed inter la Esperantistoj disvastiĝis enorme multe da malcerteco. Ke tia aŭtoritato kiel Jespersen favoris reformon, estis sufiĉe malbone, sed neniu alia je lia scienca nivelo emis entute diskuti la demandon de neŭtrala internacia lingvo.

Ĉiuokaze, la diferenco inter la reformemuloj kaj la tradiciuloj ne tiom temis pri la lingvaj detaloj, sed pri tio ĉu oni rajtu identigi sin kun la lingvo. Margrethe Noll altgrade identigis sin kun Esperanto, kaj ŝi obstine informadis pri ĝi al ĉiu kiu emis aŭskulti. Jespersen, male, ne volis koni ian identiĝon, kaj tiam ja estas malfacile impresi konvinke, kiom ajn da scienca aŭtoritato oni cetere havas.

Kaj en 1928 Jespersen rezignis. Li ne revenis al Esperanto, kaj li ne rezignis pri la ideo de neŭtrala internacia lingvo, sed li publikigis sian propran proponon de reformo de la reformo de Esperanto – kaj tio ja praktike egalas al konfeso ke li eraris la tutan tempon antaŭe.

La prospera sinteno do estis tiu de Noll. Ŝi neniam faris unu grandan heroaĵon, sed ŝi antaŭ ĉiuj simbolis tiun nesubigeblan *persiston* kiun la movado tiutempe bezonegis. Iom post iom estis allogataj agemaj homoj, kaj la organizaĵo kreskis. En 1934 oni eĉ spertis duobliĝon de la landa membronombro en unu sola jaro – ĝuste kiam la Germana Esperanto-movado komencis sperti gravajn malfacilaĵojn.

Dum la plua vivo de Noll Esperanto en Danio trankvile kreskadis. Eĉ la okupado 1940–1945 estis nur malgranda ĝeno, ĉar kvankam la Nazioj malpermesis Esperanton en Germanio kaj multaj aliaj landoj, en Danio kaj Norvegio ili lasis la asociojn daŭrigi sian laboron. Noll mortis kiel feliĉa Esperantisto.

Sed kial Esperanto en Danio komencis stagni post ŝia morto? Por respondi tiun demandon ni devas rigardi ne nur la duonan jarcenton post ŝia tempo, sed ankaŭ la antaŭajn jarcentojn. Ĉu vi sciis ke la unua profesia lingvisto de la mondo estis Dano? Kaj ĉu vi sciis ke li ellaboris projekton de internacia lingvo, kiun li neniam publikigis? Lian tombon ni nun vizitos. Ĝi estas en la tombejo “Assistens” en urboparto “Nørrebro”. Atentu la aŭtojn transirante la straton, kaj la piedirantojn sur la pado laŭ la lagoj!

#### **4-a halto: La tombo de Rasmus Rask (Assistens E-901)**

**Rasmus Rask** (1787–1832) estis inteligenta knabo de la insulo Fueno. Li estis eksterordinare lingvolerta, kaj tion rimarkis liaj instruistoj en la gimnazio de Odense. Kiam li venis al Kopenhago por studi ĉe la universitato, li do kunportis belajn rekomendojn. Estis tre bela tempo en Danio tiam, ĉar la reĝo ĉion decidis. Post siaj ekzamenoj Rask do iris al la reĝo kaj demandis:

– Diru, reĝo, ĉu mi ne povas fariĝi la unua profesoro de lingvistiko en la mondo ĉe via universitato?

– Ĝuste nun ni ne havas liberan profesorajn postenojn, – respondis la reĝo – sed vi ja povas fari vojaĝeton al Hindio kaj vidi ĉu estas vere, kiel oni diras, ke ĉiuj lingvoj originas de tie. Tiam ni tre favore rigardos vian peton.

Tiam Rask ja devis iri al Hindio. Li iris surtere tra Svedio, Rusio kaj Persio, tiel ke li povis studi ĉiujn lingvojn survoje, kaj li revenis per ŝipo.

Sed dum la vojaĝo Rask ja devis ne nur studi la lingvojn, li ankaŭ bezonis ilin por paroli kun homoj. En Sankt-Peterburgo, ĉefurbo de Rusio, loĝis homoj el ĉiuj partoj de la granda Rusa imperio, krom eminentuloj el la pliparto de Eŭropaj landoj – kaj Rask devis paroli kun ĉiaspecaj homoj. Iam li devis en unu tago jongli inter ses malsamaj lingvoj, kaj tio estis iom multe, eĉ al lingva geniulo kiel Rask. Tial li ekhavis la ideon ke estus agrable se ĉiuj homoj havus almenaŭ unu saman komunan lingvon apud la gepatra.

Tio ne estis nova ideo.  $5 + 5 = 10$ ; sed oni ja ne povas *vidi* per la vorto “kvin” ke ĝi signifas “5”, tion oni devas scii antaŭe. Kiel do, se oni povus fari lingvon el matematiko? Tiel oni havus lingvon per kiu eblus diri nur veraĵojn. Falsaĵoj simple *sonus* strange – kiel “ $5 + 5 = 9$ ” – kaj oni ne povus konvinki iun pri io nevera.

Jam longe antaŭ Rask multaj provis fari tian matematikan lingvon. Neniu el ili



sukcesis. Rask ankaŭ opiniis ke tio estas tute malgusta maniero procedi. La Germana kaj la Rusa ja pruntis multege da vortoj el la Franca kaj Latino – kial ne uzi tion kiel bazon de la vortaro de nova lingvo? La gramatiko nur estu laŭeble simpla kaj regula, sen revoj malebligi erarojn. Alivorte, Rask volis ke la internacia lingvo estu *natura* lingvo. Li sekvis tiujn samajn principojn laŭ kiuj Zamenhof kreis Esperanton.

Pri internacia lingvo Rask okupiĝis en liberaj horoj dum sia Hindia vojaĝo, kredeble precipe dum la ŝipvojaĝo hejmen. Sed li estis ia strangulo, ĉar veninte hejmen li flankenlasis sian projekton kaj anstataŭe plenanime ĵetis sin en la debaton pri – Dana ortografio! Rask havis grandan aŭtoritaton en lingvaj aferoj, kaj multaj sekvis lin. Fakte, dum pli ol jarcento preskaŭ ĉiuj Danaj lingvistoj uzis alian ortografion ol la oficialan. Tio finiĝis en 1948, kiam okazis oficiala ortografia reformo, kiu alprenis la plimulton el la proponoj de Rask.

La Danaj lingvistoj ne nur skribis kiel Rask, sed ankaŭ pri Rask. Dum longa tempo estis tradicio ke ĉiu Dana lingvisto kun ia renomo skribu ion pri Rask. Tiel faris ankaŭ Otto Jespersen, en 1918. Sed sciu kio estas stranga: En sia libreto pri Rask Jespersen ne mencias eĉ per unu vorto lian lingvoprojekton. Oni ja kredus ke utilis al Jespersen uzi la aŭtoritaton de Rask por subteni la argumenton pri neŭtrala internacia lingvo, sed tion li ne faris.

Sed kial do? Nu, ankaŭ Vilhelm Thomsen neniam menciis tion, kaj Jespersen tre admiris Thomsen. Eble ili ambaŭ timis ke la prestiĝo de Rask suferus pli multe ol gajnus la afero de internacia lingvo, se la projekto estus pli vaste konigata. Alia kaŭzo povas esti banala lingva detalo: Rask uzis specialan kromsignon super kelkaj literoj (simile al ĉĝĥĵŝŭ en Esperanto), dum Jespersen en siaj reformproponoj ĉiam insistis pri sensupersigna alfabeto.

Tiuj du aferoj eble ludis rolon, tamen Jespersen estis ne nur lingvisto, sed ankaŭ konvinkita socialdemokrato. Kaj kiel lingvokonscia socialdemokrato li tute certe havis rolmodelon, kiu hazarde ankaŭ estas entombigita en ĉi tiu tombejo. Tiun rolmodelon ni nun iras viziti. Ŝlosu la biciklojn kaj lasu ilin ĉi tie, ĉar nur sur kelkaj el la tombejaj padoj oni rajtas bicikli.

## **5-a halto: La tombo de Frederik Dreier (Assistens C-206)**

**Frederik Dreier** (1827–1853) kuŝas ĉi tie kun siaj patrino kaj onklino. Li estis medicina studento kaj mortis tiel juna ke li neniam fariĝis kuracisto. Tamen li

sukcesis impresi siajn samtempulojn per kelkaj tre revoluciaj ideoj. En Danio li estas la unua kiu nomis sin socialisto.

En la tempo de Dreier la industria revolucio apenaŭ tuŝis Danion ankoraŭ, sed li klopodegis por starigi laboristan movadon. Li provis fari sindikatojn el klerigaj asocioj, li agitadis por fondi laboristan partion, li eldonis semajnan revuon kiu estu la ĝermo de laborista gazetaro, kaj li fondis kooperativan vendejon. Sed li estis tro frua, nenio el ĉio tio postvivis lin.

Kiam la socialdemokratio venis al Danio en la 1870-aj jaroj, ankoraŭ vivis la memoro pri Dreier. Li estas la Dano inter la “utopiaj socialistoj”, antaŭulo de la Marksismo. Tial li ludas tute specialan rolon por Danaj socialdemokratoj kaj entute maldekstruloj. Jam la fama literatura kritikisto Georg Brandes (1842-1927) proponis eldonigi ĉiujn liajn postlasitajn manuskriptojn, – sed lian plenan verkaron oni sukcesis eldoni nur en 2003!

Se oni tralegas la verkojn de Dreier, oni ekkomprenas ke la “oficiala” socialdemokrata historio pri li estas sufiĉe elektema. Nome, la tuta filozofio de Dreier estis lingve bazita, kaj tion oni ne vaste sciis antaŭe. Sed krom tio Dreier estis komplete malnaciema. Li fajfis pri tio ĉu la Dana lingvo pluvivos. Li opiniis ke la Danoj iom post iom kutimiĝados uzi la Germanan, unue en suda Jutlando, poste tutlande, ĉar ja estas produktata multe pli da multe pli valora literaturo en la grandaj lingvo ol en la malgrandaj.

Sed kompreneble Dreier ne haltas tie. Same kiel la dialektoj formortos favore al la regna lingvo, kaj la Dana formortos favore al la Germana, tiel la grandaj lingvoj formortos favore al unu universala lingvo tutmonda. Kaj tiu universala lingvo estos ia lingvigita matematiko – ĝi ne estos natura lingvo, sed lingvo pli kapabla ol la naturaj. Sammaniere li opiniis ke la Dana objektive estas pli bona lingvo ol la Gronlanda, kaj la Germana pli bona lingvo ol la Dana.

Dreier do opiniis, precize kiel Jespersen poste, ke estas progreso en la lingvo (kvankam Jespersen preferis la Anglan anstataŭ la Germanan). Jespersen entute mirinde similas al Dreier, ne nur enhance, sed ankaŭ en la maniero esprimi sin. Ekzemple Dreier parolas tre laŭde pri la projekto de Rask, kaj Jespersen tre laŭdas Esperanton – sed se estas progreso en la lingvo, tiu ja ne sufiĉas.

Dreier kaj Jespersen ankaŭ havas la saman estetikon. Samkiel formortos la naciaj lingvoj, laŭ Dreier, formortos ankaŭ poezio kaj entute beletro. Tamen, se

tio havis sencon kiel pens-instiga provoko en la tempo de Dreier, en la tempo de Jespersen ĝi jam estis iom malnoviĝinta.

Jespersen opiniis ke beletro en internacia planlingvo estas miskompreno – kaj lia tre naciema, pli aĝa kolego Vilhelm Thomsen ja permesis al li opinii tion! Jespersen neniam rivelis kiom profunde influis lin Dreier, certe ĉar tio malfavore impresus ne nur al Vilhelm Thomsen, sed ankaŭ al la Marksisme inspiritaj socialdemokratoj.

Sed kvankam beletro laŭdifine estas mensogo kaj manipulado, ni ne povas malhavi ĝin. Belo ne estas malgrava, kvankam ĝi estas subjektiva. Tion komprenis Margrethe Noll, sed unu alia el la fruaj Danaj Esperantistinoj komprenis tion eĉ pli bone. Ankaŭ ŝia tombo estas en ĉi tiu tombejo, kaj ĝin ni vizitos nun.

## **6-a halto: La tombo de Marie Schröder (Assistens F-715)**

**Marie Schröder** (1882–1909) kuŝas ĉi tie apud siaj gepatroj. Same kiel Dreier ŝi mortis tre juna, sed multon efektivigis dum sia mallonga vivo. Tamen estas iom malfacile diri precize kion la Esperantomovado ŝuldas al ŝi, ĉar ŝi ne estis homo kiu enfokusigis sin mem. Ŝi volis krei belon, ne nur esti bela – kvankam ĉiuj opiniis ŝin tre bela.

Almenaŭ tiel multe ni scias, ke ŝia frato Harald estis ĵurnalisto ĉe Politiken kaj lernis Esperanton. Somere en 1907 la gazeto sendis lin tra Eŭropo por provi kiel bone oni elturniĝas per Esperanto en eksterlanda vojaĝo. (Poste oni ŝajne nenion aŭdas pri li.) Tuj post la artikoloj de Harald la kursoj de Politiken estis starigitaj, kaj por povi uzi la lingvon praktike poste, la kursanoj fondis Konversacian Esperanto-Klubon (KEK), kie Marie Schröder estis estrarano.

KEK estis kaj tre laborema kaj tre festema klubo. Tre ofte estis koncertoj kaj baloj. Jam en 1908 KEK organizis sian unuan internacian kunvenon. Ĝi estis postkongreso de la Universala Kongreso, kiu tiujare okazis en Dresdeno, Germanio. Dum okazis la postkongreso, estis aranĝita sekreta kunveno inter Zamenhof kaj Jespersen. La intenco estis revenigi Jespersen al Esperanto. Oni bedaŭrinde ne sukcesis, kvankam Jespersen tre ŝatis Zamenhof kiel personon.

Entute multaj el la iniciatoj de KEK malsukcesis, sed oni ne lasis sin malkuraĝiĝi de tio. En 1908 oni ankaŭ fondis landan asocion, la nunan Danan Esperanto-Asocion. Poste en la sama jaro oni organizis turneon, kie la landa

prezidanto kun profesia operkantisto prelegis kaj koncertis en unu urbo post alia tra tuta Danio. Sen Marie Schrøder ĉio tio tute ne ekflorus tiel rapide.

Bela, modesta, iniciatema, kuraĝa kaj laborema – krom ke Marie Schrøder certe ne estis senmorta, ŝi preskaŭ impresas kiel superhomo. Ĉu ŝi tute ne havis ombrajn flankojn? Nu, estis Esperantistoj en Kopenhago antaŭ KEK, kaj ili povis senti sin iom flankenpuŝitaj de ŝia enorma energio. Du-tri el ili sekvis Jespersen en la reformon. Sed krom tio ŝi simple ne ĝisvivis disvolvi ĉiujn siajn flankojn, ankaŭ ne la malpli flatajn.

Kio do okazas, se Esperantisto simila al Marie Schrøder havas vivon de normala longeco? La plej bona ekzemplo de tio fakte ankaŭ estas entombigita ĉi tie en Kopenhago. Sed nun ni devas fari iom longan bicikladon, ĉar li kuŝas en la antaŭurbo Rødovre.

## **7-a halto: La tombo de Ivo Lapenna (Rødovre O-928)**

Malkiel Vilhelm Thomsen en la komenco, **Ivo Lapenna** (1909–1987) tute unusence estas heroo de la Esperanta historio. Notu la mortodaton: la 15-a de Decembro 1987, la naskiĝdatreveno de Zamenhof en la centjara jubileo de Esperanto.

Lapenna kuŝas ĉi tie apud siaj bogepatroj. Lia bopatrino **Kirsten Zacho** (1913–1975) ankaŭ estis iom simila al Marie Schrøder. Ŝi estis la motoro de speciala Esperantista kultura klubo, kiu havis imponan aktivecon dum la 1950-aj kaj 60-aj jaroj.

Lapenna naskiĝis en tiu parto de Aŭstrio-Hungario kiu post la unua mondmilito fariĝis Jugoslavio. Dum la intermilita tempo li helpis defendi politikajn akuzitojn en la kortumoj. Dum la 2-a mondmilito li estis partizano. Post la milito li estis unu el la plej eminentaj juristoj en la reĝimo de Tito, sed li forlasis Jugoslavion ĉar li ne volis subteni diktaturon. Li fine fariĝis specialisto pri kompara Jugoslavia kaj Soveta juro ĉe *London School of Economics*, kredeble la plej renoma instituto de sociaj sciencoj entute.

Lapenna lernis Esperanton en 1928 kaj 10 jarojn poste li fariĝis estrarano de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Post la milito necesis ĝisfunde reformi UEA-n, kaj la rolo de Lapenna en tiu procezo meritigis al li la epiteton sur lia tomboŝtono: “La konstruinto de la moderna Esperanto-movado”. Lia plej granda ekstera sukceso estis en 1954, kiam li fondis la rilatojn inter UEA kaj

Unesko. Tio postulis enorman antaŭlaboron. En la 1960-aj jaroj oni provis interesigi la Unuiĝintajn Naciojn (UN) pri la lingva demando. Tio bedaŭrinde ne estis sukcesa. “Evidente la tempo ne estas matura,” oni diris.

Tiam oni ja devis provi maturigi la tempon. Lapenna estis inter la unuaj kiuj parolis pri lingva diskriminado kaj lingva imperiismo en la 1960-aj jaroj – post la fiasko en UN. Tiujn esprimojn oni simple ne uzis antaŭe, ankaŭ ne ekster la Esperanto-movado. Sed la movado ne estis matura por tio. En 1974 Lapenna eliris el UEA kaj brue ĵetfermis la pordon post si.

En Sovetio kaj orienta Eŭropo ĝis 1953 Esperanto estis same malpermesita kiel en Germanio sub Hitler, sed post la morto de Stalin la movado tie komencis revigliĝi. Lapenna mem opiniis ke lastinstance KGB decidis forpuŝi lin. Estas kredeble io en tio, ĉar en totalismaj ŝtatoj ĉio principe devas esti sub ŝtata kontrolo – nur estas necerte kigrade KGB celis Lapenna persone. Oni neniam sukcesis ĝisfunde esplori tiun aferon, kaj dubindas ĉu oni iam sukcesos.

Tamen tio signifas multe malpli oni povus kredi. La sorton de Esperanto oni ne decidas en la malpli feliĉaj landoj de la mondo, sed en la feliĉaj – ĉar se la mondo povas esti feliĉa sen Esperanto, kiom do Esperanto valoras? Tiun demandon oni ne povis starigi en la tempo de Lapenna, ĉar tiam oni ankoraŭ ne komencis *mezuri* feliĉon, almenaŭ ne tiun de tutaj landoj.

Danion oni ja kutime konsideras tre feliĉa lando. Tial aparte gravas kion *Danaj* Esperantistoj faras por maturigi la tempon por Esperanto. Kaj tial aparte gravas ke *Danaj* Esperantistoj konu la historion de la internacia lingvo, tiel ke ni scios ne nur kiujn tradiciojn ni volas konservi, sed ankaŭ kiujn ni volas anstataŭigi – kaj per kio ni volas anstataŭigi ilin.

Kelkaj Esperantaj tradicioj estas jarcentojn pli aĝaj ol Esperanto mem. Prenu ion tian kiel la fantaziaĵojn de Dreier pri lingvo perfekta. Tiu ideo aĝis jam kelkajn jarcentojn kiam Dreier aliĝis al ĝi. Zamenhof mem opiniis ke li kreis perfektan lingvon en Esperanto. Tion saman opiniis Lapenna, kvankam li moderigis ĝin al “relative perfekta”.

Sed kiel ni ankaŭ vidis ĉe Dreier, la ideo de perfekta artefarita lingvo nedisigeble rilatas kun kultura rasismo. Eble estas iom malfacile kompreni kio malĝustas se oni rigardas la Gronlandan lingvon kiel malpli valoran ol la Danan. Eble kelkaj iomete maltrankviliĝas se oni asertas ke la Feroa estas

malpli valora ol la Dana. Sed se iu aŭdacas aserti ke la Dana lingvo estas malpli valora ol la Germana, tiam mi ĵuras al vi ke subite multegaj homoj tute klare ekkomprenas la principon!

Ĉio tio, tamen, kompreneble estas nur teorio. Praktike Esperanto estas unu granda kontraŭrasisma projekto kaj ĉiam estis. Sed se teorio kaj praktiko malharmonias, homoj povas senti tion. Kaj se ili ne scias kion fari por reakiri tiun harmonion, tiam ili iom post iom malaktiviĝas. Do jen kial la Esperantomovado havis tiel malmulte da allogkapablo en feliĉaj landoj dum la lasta duona jarcento.

Ni do dividas kun Dreier tradicion kiun ni devas anstataŭigi. Ŝajnas ke Rask havas ion kion ni povas utiligi. Facile ne estos, ĉar se oni volas anstataŭigi tradicion, necesas maturigi la tempon por tio. Sed iom post iom fariĝas pli kaj pli klare kio estas farenda.

Scii tion ni tamen ne povus sen la kontribuoj de ĉiuj kiujn ni vizitis hodiaŭ – la heroojn, la friponojn kaj tiujn inter ili. Ankaŭ *vi* ne subtaksu *vian* kontribuon. Vi devas nur memori ke ĝi estas parto de ĉeno – kaj se tiu ĉeno ne estas tiu de duaranga Usona rapidmanĝejo, tio estas pli ol en ordo.

*La itinero laŭ Googlemaps:* <http://bit.ly/2pwGLRc>.

*Fotoj de Betty Chatterjee:* <http://bit.ly/2pzYI3m>.

## **Miaj impresoj el vojaĝo en Nepalo**

La 21-an de februaro mi kaj Peter sidas en la aviadilo, kiu tuj ekstartos. Mi al Nepalo veturas la unuan fojon kaj tial estas ege interese.

La aviadilo malsupreniĝas en la araba granda brila flughaveno Doha, en Kataro. Ni atendas ĉirkaŭ 2 horojn kaj ĝuas atendadon de nia alia flugo, trinkante kafon.

Tempo pasis rapide kaj ni denove sidas en aviadilo al Katmanduo. Kiam ni eliris la aviadilon, antaŭ ni staris modesta mizera, sed afabla kaj varma al la koro flughaveno de Katmanduo.

Ni estis renkontitaj de esperantisto Bharat Kumar Chimire kaj veturigitaj al hotelo per taksio. Estis grandega avantaĝo veturi per aŭto. Ekzistas nek semaforoj nek trotuaroj. Sur la stratoj iras homoj kaj veturas aŭtoj, busoj

kaj motorcikloj, iam bicikloj kun ĉaroj, kaj oni vidas ankaŭ bovojn kaj bovinojn. Plej interese estis al mi, ke ĉio funkcias. Neniu koleriĝas kaj estas respekto al aliaj. Mi kaj Peter alvenis 3 tagojn pli frue por ke ni havu pli da tempo koni la urbon.



Dum du tagoj, danke al Kriŝna, amiko de Peter, ni havis eblecon konatiĝi kun la eduka sistemo en lernejoj kaj gimnazioj, ĉar Kriŝna estas ĉefo de kvar lern-institucioj. Ni ankaŭ kune ekskursis, vizitis kelkajn templojn kaj aliajn interesajn lokojn.

Post tri tagoj ni translokiĝis al alia hotelo, Marshyangdi, kien venis aliaj partoprenantoj de 12-a Himalaja Renkontiĝo. Ni estis 28 eksterlandanoj: 15 el Japanio, 6 el Slovakio, 2 el Usono, 1 el Vjetnamio, 1 el Tajvano, 1 el Germanio kaj 2 el Danio.

Ni ĉiuj estis bonŝancaj ĉar ni estis invititaj al la geedziĝa festo de Esperanta familio. Estis ege ĝoja festo kun dancoj bonega manĝaĵo, ankaŭ vegetara. Belegaj virinoj, vestitaj per naciaj vestoj. La kelneroj zumis ekstere sur la grandega teraso proponante bongustaĵojn, trinkaĵojn kaj drinkaĵojn. La ĉarma geedza paro staris en la altigita niĉo kaj akceptis bondezirojn de la gastoj kaj fotadis sin kun ĉiuj. Malfrue vespere ni revenis al hotelo.

Nia ĉefa celo estis marŝado al la monto Anapurno. Do, ni post la tagmanĝo forveturis buse de Katmanduo. Estis longa vojaĝo pro la malbonkvalita vojo kaj densa trafiko. Ni tagmanĝis survoje en restoracio ekstere. La manĝaĵo estis tre bongusta. Vespere ni atingis urbon Pokhara. La urbo estis pura kaj bela kun asfaltitaj stratoj kaj trotuaroj. Nia hotelo troviĝis en belega naturo ĉe la lago. Antaŭ ol manĝi ni aŭskultis folkloran koncerton ĉe la hotela restoracio. La vetero estis milda kaj agrabla.

Matene ni pakis niajn dorsosakojn por 5-taga grimrado en la montaro. Unue iom da vojo ni veturis per buso sur mallarĝaj truo-plenaj serpentformaj vojetoj. Mi iam eĉ spiri timis pro la timo fali en abismon, sed post

iom da tempo oni al kutimiĝas.

Estis granda ĝojo, kiam ni atingis lokon, kie startis nia marŝado. Piedirante, mi ĝuis belegan naturon. Ni preterpasis riveron Nadi Khola, kie Ĉinoj konstruis hidro-elektrejon. Ni iris per ponteto, pendanta per feraj teniloj.

Nia taga celo estis atingi la vilaĝon Tantung. Vespere vilaĝanoj atendis nin kun kronoj, plektitaj el floroj. Niaj ĉiuj vangoj kaj fruntoj estis pentritaj per ruĝa koloro. Antaŭ la manĝo ni renkontiĝis en unu loko. Venis ankaŭ vilaĝanoj Ili dancis, kantis al ni, kaj ankaŭ ni dancis kune. Estis vere kortuŝe vidi tiel bonkorajn, varmajn homojn.

Ni dormis en la dometoj po du aŭ tri personoj ĉe la vilaĝanoj. Ili faris al ni vespermanĝon kaj matenmanĝon. Estis ne kutima vivo al ni. Necesejoj estis ekstere kaj noktoj tre malvarmaj. La kondiĉoj vere ne estis dorlotaj, sed malgraŭ tio mi estis tre danka al la vivo, ke mi havis eblecon sperti tion ĉi.

Matene ni ankaŭ ricevis florajn kronojn kaj ni estis denove benitaj per pentraĵoj sur vangoj kaj fruntoj. Post tiu ceremonio ni daŭrigis la marŝadon al alia vilaĝo, Sikles.

Sabate, la 4-an de marto, ni atingis la pinton Tara Hill Top, kies alteco estas tri mil metroj. La marŝado estis por mi tiel interesa, ke malgraŭ ŝvito kaj laciĝo mi ĝuis ĉiun sekundon, avide enspirante freŝegan aeron. Mi faris ankaŭ iom da fotoj per telefono, sed miaj okuloj fotis senĉese tiujn mistikajn montojn kaj ruĝkolorajn florarbojn, belegajn pejzaĝojn, kiuj eĉ haltigas la spiradon.

En la pinto de Tara Hill Top ni kunparolis sidante ĉe la fajro, manĝis varman freŝe faritan vespermanĝon. La montoj estis dronintaj en la mallumo, sed oni povis vidi malklarajn siluetojn danke al brilantaj steloj sur la ĉielo. La temperaturo estis ĉirkaŭ 0°C.

Mi sentis min dormema kaj iom laca, do estis granda plezuro iri dormi. Ĉi tiun vesperon niaj dormejoj estis tendoj. La mateno estis serena, mirakle bela. Leviĝante la suno briligis la neĝkovritajn masivojn de Anapurno. La ĉielo estis tiel klara, aero pura freŝa kun monta aromo. Mi sentis min



kvazaŭ mi estus en belega sonĝo, kiu povus daŭri senĉese. Bedaŭrinde ĉio havas finon. Do ni ĉiuj fotadis kaj fotadis kvazaŭ ni povus ĉion tion konservi sur papero. Venis tempo adiaŭi kaj malsupreniri. Ni ĉiuj havis bonan humoron kaj daŭris la marŝadon en bona etoso.

La lasta vilaĝo kie ni dormis, nomiĝas Ghale Kharka. Kiel ĉiam estis bona vetero kaj belega naturo. Sed ĉi-foje feliĉo gvidis ne ĉiujn. Stanka el Slovakio falis kaj rompis al si gambon. Tiu novaĵo malĝojigis la reston de la tago. Sed feliĉe estis, se oni povas tiel esprimi, ke tio okazis la lastan tempon de la marŝado.

Estis komplike transporti ŝin malsupren. La organizantoj faris ĉion por helpi tiel bone, kiel oni povis en tiuj cirkonstancoj. Nepalano malgranda sed forta portis ŝin malsupren surdorse, ofte farante ripozan paŭzojn. Nokte ŝi estis flegita en la hospitalo de Pokhara. Grandegan atenton montris la nepalaj Esperantistoj. Unu el ili, Shree Pokharel, flugis kun ŝi al Katmanduo. Aliaj restis kun ni ĉiuj en Ghale Kharka por partopreni folkloran dancadon, kiujn prezentis al ni vilaĝanoj.

La sekvan tagon ni revenis al la sama hotelo en Pokhara, ĉe la sama ĉarma lago, kiu estas la due plej granda freŝakva lago en Nepalo. Matene post la manĝo ni forveturis al Katmanduo. Rapide kuris la tempo.

Vespere estis adiaŭa vespero. Partoprenis multaj esperantistoj, ankaŭ tiuj, kiuj ne marŝadis al la montaro. Multaj esprimis siajn impresojn, bondezirojn al ĉiuj. Ni ĉiuj ricevis diplomojn pro la sukceso atingi la pinton de Tara Hill Top. Staras tri subskriboj sur ĝi: Ĉefo de la Renkontiĝo L. P. Agnihotry, ĉefgasto Hori Jasuo, prezidanto de NEA Indu Devi Thapaliya.

La lasta tago estis bunta. Iuj forveturis matene, aliaj tagmeze. Ni kelkaj havis tempon ĝis la vespero, do ni simple promenadis, manĝis en restoracio kaj aĉetadis laŭplaĉe. La lastaj estis mi kaj Peter. Vespere ni trikisteon en hotelo kun la ĉefa organizinto Bharat Ghimire. Nin veturigis en flughavenon Kriŝna per la aŭto. Ne estis ĝoje al mi adiaŭi, sed la penso ke mi revenos, mildigas miajn ĉagrenojn.

*Zita Blaust*

## De jarlibro al “horlibro”

Sabate la 22-a de aprilo lanĉiĝis nova socia reto, Amikumu. Ĝi estas uzebla per saĝtelefonoj kaj montras la cent plej proksimajn Esperanto-parolantojn, kiuj membras en ĝi.

Ene de unu semajno aliĝis jam *pli ol 3 000 homoj* el certe almenaŭ kvindek landoj. En kelkaj grandaj urboj membras jam pli ol deko da Esperanto-parolantoj.



“Amikumu” donas bonan eblecon por kontakti aliajn Esperanto-parolantojn – oni renkontiĝas unue en la reto kaj povas poste interkonsenti pri rendevuo eksterrete. Jen nova ebleco por trovi la enretajn Esperanto-parolantojn, kun kiuj ĝis nun ne tro facilis eksterreta kontakto.

Por ke tio funkciu, necesas ke ankaŭ la homoj el la tradicia Esperanto-komunumo aliĝu al Amikumu kaj prezentu sin tie. Instrukcioj kiel fari troviĝas sur <https://amikumu.com>.

En 1908 Hector Hodler lanĉis novan ideon – jarlibron, kiu faciligis trovi aliajn Esperanto-parolantojn. La nova ideo, kiun nun realigis Chuck Smith kaj Evildea kun sia teamo, 109 jarojn post Hodler, estas iusence nova versio de jarlibro. Sed tiun ĉi version ni povas nomi “horlibro” (aŭ eĉ “minutlibro”), ĉar ĝi estas daŭre aktualigata.

## Aperis libreto de Pasporta Servo

Ne kredu ke la papera epoko jam tute forpasis! Post plurjara paŭzo denove estas aĉetebla la adreslibro de Pasporta Servo en papera formo!

La 15-centimetra kaj 248-paĝa libreto enhavas adresojn kaj datumojn de 974 gastigantoj en 81 landoj.

La libro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA kontraŭ 9 eŭroj (+ sk) laŭ la reta katalogo <http://katalogo.uea.org?inf=3474>.

La retejo de la senpaga gastiga servo Pasporta Servo troviĝas ĉe <http://www.pasportaservo.org>.

[Ret-Info]

## LibroServo vendas...



Bonvolu sendi mesaĝon al Arne Casper ([arnecasper@yahoo.com](mailto:arnecasper@yahoo.com)) se vi deziras mendi libro(j)n:

(Al la prezo mencita mi aldonas afrankon)

**Arthur Conan Doyle: La aventuroj de Ŝerloko Holms**o (krimromano). Dkr. 200,00, el la angla tradukis i.a. Istvan Ertl kaj Trevor Steele, 146 paĝoj, 2013 Sezonoj, Kaliningrado.

**Arthur Conan Doyle: La ĉashundo de la Baskerviloj** (krimromano) Dkr. 130,00, el la angla tradukis William Auld, 167 paĝoj, Kaliningrado, 2010.

**La Edda de Snorri Sturluson** (mitologia literaturo). Dkr. 160,00, el la islanda tradukita de Baldur Ragnarsson, 158 paĝoj, Mondial.

**J.R.R. Tolkien: La Hobito aŭ tien kaj reen** (beletro). Dkr. 185,00, el la angla tradukis Ĉristopher Gledhill kaj William Aŭld, 223 paĝoj, 2005 Sezonoj Kaliningrado.

**L. Zamenhof: Kongresaj paroladoj** (Originalaj paroladoj de la kongresoj 1905–1912). Dkr. 60,00, kompilis Alexander Korjenkov, 64 paĝoj, Kaliningrado, 2015.



*Emilio Cid, Brazila estrarano de UEA pri informado, vizitis Kopenhagon en aprilo okaze de estrarkunsido en Roterdamo. Kelkaj kopenhagaj esperantistoj havis kun li agrablan tagon.*

